

# TEA-BULTENO

8<sup>A</sup> JARO

MAJO - JUNIO 2005

NUMEROJ 5-6

Maja Programo	
03 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
06 - vendredo	20.00 - Vagade tra Ĉinio - videofilmo
10 - mardo	20.00 - Preparlaboroj por la 15 <sup>a</sup> Alp-Adria Konferenco
13 - vendredo	20.00 - Preparlaboroj por la 15 <sup>a</sup> Alp-Adria Konferenco
17 - mardo	20.00 - Preparlaboroj por la 15 <sup>a</sup> Alp-Adria Konferenco
<b>20 - vendredo</b>	ekde la 17 <sup>a</sup> horo - Akcepto de Alp-Adriaj Konferencanoj en TEA-sidejo (vidu la programon ĉiflanke)
24 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
27 - vendredo	20.00 - Trafoliumado de PIV!
31 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
Junia Programo	
03 - vendredo	20.00 - <i>Lecturae Dantis</i> en Esperanto
<b>05 - dimanĉo</b>	<b>Amika Festo en Istrio ĉe Marĉelo Trampuh (Kastelir)</b>
07 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
10 - vendredo	20.00 - Verboj + prepozicioj - traduka ekzercado
14 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
17 - vendredo	20.00 - Poeziaĵoj de d-ro Paolo Alessi pri triestaj personecoj
<b>18 - sabato</b>	<b>17.00 - en <i>Le Chiesiole (Cimpello di Fiume Veneto - Pordenone)</i> Konferenco de prof. Carlo Minnaja pri la esperantista pioniro Don Giacomo Bianchini (vd. detalojn je 2<sup>a</sup> paĝo)</b>
21 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
24 - vendredo	20.00 - Triesto kaŝita
28 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo

## Proverboj

Ne ekzistas kareso sen intereso

## 15a Alp-Adria Esperanto-Konferenco Trieste, 21-22 majo 2005

Karaj Alp-Adrianoj! Lastfoje, en 2002, ni renkontiĝis en Rijeka, Kroatio, kaj nu, finfine, estas la momento reaktiviĝi kaj daŭrigi tiun kunlaboradon komencitan en 1989. Triesto kaj Triesta Esperanto-Asocio atendas senpacience vin ĉiujn kaj promesas varman akcepton kaj ĝuindan semajnfino!

**Konferenca temo: Adriatika Maro, renkontiĝejo de lingvoj kaj kulturoj diversaj**

Jen la programo:

<b>Vendr.</b> 20/05	ekde la 17 <sup>a</sup> horo ĉe sidejo de TEA, via del Coroneo 15 - 3 <sup>a</sup> etaĝo: Akcepto de la konferencanoj <b>19.30</b> - Interkona vespero
<b>Sab.</b> 21/05	Ĉe TEA-sidejo: <b>10.30</b> - Inaŭguro de la Konferenco, salutvortoj de la delegitaro <b>11.30</b> - D-ro Carlo Minnaja (Padova): Lingvo, libroj kaj protokoloj en la teritorio de Venecio <b>12.30</b> - Bufedo <b>14.30</b> - Inĝ. V. Morankić (Rijeka): Lingvoj ĉe Adriatiko <b>15.15</b> - Prof. Bardhyl Selimi (Tirana): La etno-kulturaj karakterizaĵoj de Albanoj <b>16.00</b> - M. Belošević (Zagreb): Borde de Adriatiko: kroata lingvo kaj kulturo <b>16.45</b> - Mag. J. Jug (Ljubljana) - prelego <b>17.30</b> - Konferencanoj kunsidas <b>18.30</b> - Elena Zerpini - "Barcolana", reĝino de regatoj en Adriatika kaj Mediteranea Maroj (videofilmo) <b>20.30</b> - Komuna vespermanĝo
<b>Dim.</b> 22/05	<b>10.00</b> - Promenado ĉe la maro kaj vizito de Natura Mar-Rezervejo de Miramare <b>13.00</b> - Komuna tagmanĝo, ĉe Junular-Gastejo <b>15.00</b> - Konferencanoj kunsidas <b>16.00</b> - Fermo de la Konferenco



## **Ekspozicio kaj kunveno pri “Don Bianchini kaj Esperanto”**

Elvokivan preĝejeton, populare nomatan “*Le Cisiolo*” kaj konstruitan en tre fora tempo (1251 j.) tre ofte oni retrovas en la verkitaĵoj de Don Giacomo Bianchini, kiu estis paroĥestro de Cimpello ekde 1927 ĝis 1954. Renoma li estis tutmonde, pro lia eminenta esperantista laborado. Sed ne nur en tiu medio li estis konata: fakte li streĉe agadis en loka socia medio. Por rememori lin kaj lian aktivadon kaj ĉefe diskonigi lian personecon, estis decidite, fare de lokaj asocioj kunlabore kun NOVA ESPERO FRIULI, aranĝi manifestacion por lokanoj kaj esperantistaro.

En Cimpello di Fiume Veneto (PN), ĉe la Paroĥa Centro, disvolviĝos la jena programo:

★ 17.00 - Esperantlingva Di-servo

★ 18.00 - Salutvortoj de organizantoj kaj aŭtoritatuloj

★ 18.15 - Diversaj prelegoj pri la pastro:

1. Don Antonio Zanette - DON GIACOMO BIANCHINI, PASTRO DE ANIMOJ

2. Prof-ro Giovanni Strasiotto - LOKA HISTORIA KUNTEKSTO DUM LA PRELATECA PERIODO DE DON BIANCHINI

3. Prof-ro Carlo Minnaja - PRIESPERANTAJ SPERTOJ DE DON BIANCHINI KAJ HISTORIO DE ESPERANTO

★ Sekvos publikaj intervenoj.

★ 20.30 - Malfermo de la foto-dokumenta kaj libra ekspozicio rilate al Don Bianchini kaj Esperanto.

Por pliaj informoj, bv. vin turni al s-ro Giacomino Martinez (Nova Espero Friuli): tel. 0432 530326; rete: giacominomartinez@yahoo.it.

Triestanoj, dezirantaj ĉeesti la interesan aranĝon, kontaktu la sekretarion. Eblos tien veturi per malgranda aŭtobuseto: fruaj sinanoncoj bonvenas!

## **TRIESTO KASITA**

*Malkovru nekonaĵajn erojn de nia urbo!*

### **LA MAROMETRO**

Ĉe bazo de *Ponterosso* [ruĝa ponto], sur la plataĵo iam subtenanta la turneblan ponton, je n-ro 10<sup>a</sup> de strato *Rosini*, rimarkeblas gradigita ŝtono: ĝi markas la altecon “PUNKTO NULO” super la mara nivelo kaj la tajdo-variadojn (sesonajn mezvalorojn).

Ĉi tiu geografia punkto estis elektita kiel ununura gvidosigno de “PUNKTO NULO” por la tuta kartografia alprenado de la granda Habsburga Imperio.

### **LA PATRO DE GIMNASTIKO**

En 1884, la germanlingva Komunumo en Triesto, konsistanta el preskaŭ 10 mil homoj, starigis sportan asocion. Fondiĝis, do, la *SOCIETÀ AUSTRIACA DI GINNASTICA-EINTRECHT* [Aŭstra Gimnastika Societo - aintreht]. Tamen nur en 1902 ĝi akiris, per granda publika monofero, fakte kompletigita de la ŝtataj aŭtoritatoj, la necesan kapitalon por konstrui daŭre funkciantan sidejon.

Tiel en *via del Coroneo* [strato de koroneo] n-ro 15<sup>a</sup>, sur la eksa bienposedaĵo *Slataper*, estis konstruita palaco, la nuna sidejo de GERMANA KULTURO-INSTITUTO. Konstrulaborojn plenumis firmao *Martellanz*, laŭ projekto de

ingenjero *Krause*. La domo, dum sia plurjara historio, estis krome sidejo de SPELEOLOGIA SOCIETO HADES kaj, ekde 1915, transformiĝis en militistan hospitalon dum la periodo de la unua Mondmilito.

Centre de la fasado elstaras bareliefo de *Friedrich Ludwig Jahn* [fridriĥ ludvig jan] (1778-1852), “patro” de la germana gimnastiko.

3ESTULO

## **Esperanto kaj Filatelo**

En la revuo *IL FRANCOBOLLO* (La Poŝtmarko) – oficiala organo de *UNIONE FILATELICA LOMBARDA-1892* (Lombarda Filatela Unio) same de *ASSOCIAZIONE ITALIANA DI STORIA POSTALE* (Itala Asocio de Poŝta Historio) – publikigis 3-paĝa artikolo pri Esperanto de Elda Doerfler, vic-prezidanto de Esperanto-Ligo Filatelista—Amika Rondo de Esperantaĵ-kolektantoj.

Post mallonga prezento de la lingvo internacia, legendas vasta klarigo pri la evoluo de la filatela fako de Esperanto ekde la interesiĝo en la unuaj gravaj filatelistaj revuoj: kiam en 1903 aperis la unua vortaro franca-esperanto pri filatelaj terminoj de René Lemaire, kiun sekvis vortareto de elstara filatelista firmao en Leipzig (Germanio) kaj poste (1928) eldoniĝis angla-franca-germana-esperanta vortaro fare de filatelista spertulo, membro de la Akademio de Esperanto.

La unuan specialan stampon kun esperantaj skribaĵoj eligis (1912) la Aŭstria Poŝta Administracio kaj post 13 jaroj aperis la unua poŝtmarko enhavanta esperantlingvajn surskribojn, okaze de la 25<sup>a</sup> datreveno pri la morto de Popov (1925), kiun Soveta Unio celebris kiel “inventisto de la radio”.

Iom-post-iome kromaj emisioj fare de aliaj ŝtatoj pliriĉigis la esperantajn filatelaj-kolektojn, dum por kunligi la esperantistajn filatelistojn fondiĝis “Esperanto-Ligo Filatelista – Amika rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj” (ELF-AREK) cele al informado kaj subteno de la filatela agado pere de la bulteno LA VERDA LUPEO.

Konklude, en la artikolo elstaras aparte bela folio konsistanta el 16 poŝtmarkoj kun esperanta talono, elmetita de la *CHINA NATIONAL PHILATELİK CORPORATION* (Ĉina Filatela Kompanio), kaj surtute la grava Ekspozicio pri historio de la lingvo internacia per poŝtmarkoj, tutajoj, stampoj kaj korespondaĵoj okazonta en kadre de la venontjara UK en Florenco.

Bonenhava artikolo, bele ilustrita, kiu digne priskribas la rolon de Esperanto, internacia komunikilo, ĉe la antonomazia ilo de komunikado: la Poŝtmarko.

Viglo

### **ITALA ĴURNALISTO PREMIITA**

**Amerigo Iannaccone**, konata literaturisto, verkisto, organizanto de literaturaj konkursoj, eldonisto, redaktoro de LA FLUGFOLIO, monata literatura kaj kultura gazeto, ricevis la Internacian Ĵurnalistan premion INARS CIOCIARIA, aŭspiciatan interalie de la nacia konsilio de la ĵurnalistoj. La motivigo tekstas jene: “Al Amerigo Iannaccone kiu per sia laboro kiel prozisto, poeto, eseisto, eldonisto, tradukisto al esperanto, prizorgas kaj promocias la kulturen identecon de la historiaj regionoj de Italio.”



## **Historia libro: kongresoj kaj multe pli**

### **"SED HOMOJ KUN HOMOJ" HISTORIO PRI CENT JAROJ DE UNIVERSALAJ KONGRESOJ**

**Ziko Marcus Sikosek:** "Sed homoj kun homoj. Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005." Rotterdam: UEA, 2005. 197 paĝoj. 24cm. Prezo: broŝurita 21,00 EUR, bindita 30,00 EUR; triona rabato ekde 3 ekz.; aldoniĝas sendokostoj kaj, por EU-landoj, imposto de 6%.

La unua libro, kiun UEA eldonis ĉi-jare, estas forta kandidato por fariĝi la ĉefa furoraĵo de la Esperanta libromerkato en 2005. Temas pri la libro "*Sed homoj kun homoj*" de la juna germana historiisto *Ziko M. Sikosek* pri la 100-jara historio de Universalaj Kongresoj de Esperanto. La aŭtoro, jam konata pro "*Esperanto sen mitoj*", prezentas en sia nova verko naŭdek ĉapitrojn pri naŭdek kongresoj, krome longan enkondukon pri la historio de la kongres-organizado ĝenerale.

Kiam alproksimiĝis la jubilea jaro 2005, UEA komisiis al *Sikosek* la verkadon de por-okaza libro, facile legebla, riĉe ilustrita, kiu direktas sin al la tuta esperantistaro. *Sikosek* esploris en la BIBLIOTEKO HECTOR HODLER, intervjuis oficistojn eksajn kaj nunajn kaj partoprenintojn de UK-oj. Rezultis libro verkita en ĵurnalisma, flua stilo. Tamen en la fino de la libro aperas la necesaj fonto-indikoj. La anekdoto-plena verko ne nur estas amuza, sed ĝi ankaŭ klerigas la leganton pri la Esperantomovado ĝenerale: la UK estis ĉiam ja ankaŭ forumo por asocioj, artistoj, sciencistoj kaj "simplaj esperantistoj".

*Sikosek:* "Precipe gravis al mi, ke la ĉapitroj pri la unuopaj kongresoj havu variecon. La kongresoj ja ne radikale malsamas unu de la alia. Sekve, mi prezentas unu kongreson el la vidpunkto de komencanto, alian el tiu de la prezidanto de UEA, por la fruaj kongresoj ekzistas aliaj fontoj ol por postaj, ktp." En enkondukaj ĉapitroj li gvidas la leganton al la diversaj epokoj, nome la frua "bela epoko", la tempo inter la mondmilitoj, la Malvarma Milito kaj la tempo post la falo de la Berlina Muro. "Mi provis verki la libron tia, ke oni flue povas legi de la komenco ĝis la fino, aŭ ĉiam nur unu ĉapitron, ekzemple en kluba vespero aŭ je la enlita legado tagfine."

Inter la multaj intervjuitoj, kies rememoroj kontribuis al la estiĝo de la libro, estis *John Wells*, *Renato Corsetti*, *Helga* kaj *John Rapley* kaj preskaŭ ĉiuj ankoraŭ vivantaj Konstantaj Kongresaj Sekretarioj. *Sten Johansson*, *James Resende Piton* k.a. liveris ĉapitretojn pri unuopaj temoj kiel Belartaj Konkursoj kaj poŝtmarkoj. Ankaŭ la nuna Ĝenerala Direktoro de UEA, *Osmo Buller* servis al *Sikosek* kiel unu el liaj fontoj, kaj nun ĉiuj esperantistoj povos legi la faman epizodon pri la renkontiĝo de la juna kongreshelpanto kun *I. Lapenna* en Helsinko 1969.

Kio estis plej surpriza por *Sikosek* dum la verkado? "Mi ne sciis ke *Humphrey Tonkin* estis tiel, 'senmitiga', kritikema kiel junulo, li trovis en la sesdekaj jaroj tre fortajn vortojn pri la kongresoj. Foje la homoj havas interese malsaman rememoron, ekzemple kiu ekzakte fondis iun, nun tradician, programeron. Sukceso ŝajne havas multajn patrojn." Ĉu *Sikosek* malkovris multajn mitojn kaj skandalojn? "Mi almenaŭ ne serĉis tion. La libro ja estas verkita nome de UEA, ĝi devas klopodi esti

neŭtrala kaj akceptebla por pli-malpli ĉiu esperantisto. Tamen ne eblis eviti la skandalojn, kaj nun oni povas legi kial fakte *Edmond Privat* rezignis en 1928 aŭ kiuj estis la diferencoj inter la prezidanto *Lapenna* kaj la prezidanto *Tonkin*."

Kun pli ol okdek bildoj la libro "*Sed homoj kun homoj*" estas tre alloga eldonita, pro kio ĝi bone taŭgas ankaŭ kiel donaco, eĉ por neesperantistoj. La libro estas havebla en broŝurita kaj malmole bindita versioj.

*El tit-paĝaro de UEA*

## **Prezidanto de UEA alparolis**

### **la Komisionon pri Homaj Rajtoj de UN**

Du reprezentantoj de UEA, prezidanto Renato Corsetti kaj mag. Andy Kuenzli, partoprenis la laborojn de la 61<sup>a</sup> Sesio de la Komisiono pri Homaj Rajtoj de UNUIĜINTAJ NACIOJ en Ĝenevo. La Sesio mem daŭras dum unu monato kaj alfrontas ĉiujn subtemojn ligitajn al la respekto de la homaj rajtoj en ĉiuj partoj de la mondo. La reprezentantoj de UEA partoprenis en la tagoj, en kiuj oni diskutis i.a. pri kulturaj rajtoj kaj edukado.

Partoprenante kunvenon kun la Speciala Raportisto pri rajto je edukado, M. Vernor Munoz Villalobos, la reprezentantoj de UEA povis alparoli la kunvenon. En siaj alparoloj Renato Corsetti, prezentinte Universalan Esperanto-Asociacion kaj la apartan intereson de esperantistoj pri lingvaj homaj rajtoj, substrekis la neceson, ke la fina rezolucio emfazu ankoraŭ pli la rajton je la edukado en la denaska lingvo de infanoj kaj la lingvajn homajn rajtojn ĝenerale. La interveno de Corsetti estis akceptita de la Speciala Raportisto, kiu mem citis sukcesajn kazojn de edukado en la gepatra lingvo kaj promesis sekvi la temon dum sia mandato. Tuj poste ankaŭ la reprezentanto de UNESKO, sinjoro Singh, de la fako pri lingva diverseco ĉe UNESKO, petis parol-raĵton por klarigi, ke tio kongruas kun la nuna politiko de UNESKO mem. Fine de la kunveno, en interparolo kun la Speciala Raportisto de UN, estis intersanĝitaj promesoj pri estonta kunlaboro inter UEA kaj la Speciala Raportisto, juna kostarika diplomato, kiu intencas lanĉi tra la mondo serion de enketoj pri ĉi tiuj temoj kaj bonvenigas la kunlaboron de esperantistoj. La reprezentantoj de UEA profitis la okazon ankaŭ por altiri lian atenton al la skriba deklaro de UEA, kiu estis jam prezentita al ĉiuj landaj delegitaroj (vd. Gazetaraj UEA-Komunikoj, n-ro 199, 2005-02-05).

Estas malfacile diri, kiu estos la sekvo de tiu skriba deklaro. En kunveno pri la malneto de la rezolucio pri edukado, en kiu nur ŝtatoj rajtis paroli, la postan tagon la reprezentantoj de UEA rimarkis, ke la malpermeso de lingva diskriminacio en edukado estas klare formulita. Eble plia eĥo de la skriba deklaro de UEA estas la enmeto de la Programo por Evoluo de UN, pri kiu aparte parolis la deklaro de UEA, inter la Agentejoj de UN, kiuj devas partopreni la difinadon de la eduka politiko de UN/UNESKO.

La reprezentantoj de UEA disdonis informan materialon al reprezentantoj de pluraj Ne-Registaraj Organizaĵoj. Ĝi estis disponigita ankaŭ sur la tabloj rezervitaj por la NRO-oj kaj ĉe kontaktoj kun landaj delegitaroj kaj kun alispecaj gravuloj, kiel Marco Pannella, eŭropa parlamentano, interesiĝanta pri Esperanto.

Fine estis okazo por interparoli ankaŭ kun Renata Blom, la prezidantino de CONGO, t.e. la reprezenta organo de la NRO-oj, pri la estonta kunlaboro inter UEA kaj la reto de NRO-oj en Ĝenevo.

*Kelkaj pripensoj de Renato Corsetti:*

- UEA potencie havas tre pli grandajn eblecojn en UN-Ĝenevo ol ĝi sukcesas eluzi. Ni rajtus havi poŝkeston tie kaj uzi ĉambrom komune kun aliaj asocioj. Temus pri speco de oficejo, kiu efikus, se estus esperantisto el Ĝenevo aŭ ĉirkaŭaĵoj, kiu irus almenaŭ unu fojon semajne por renkonti la reprezentantojn de aliaj NRO-oj, preni la poŝton, ktp.
- En ĉi tiu sama konferenco ni estus povintaj ricevi ĉambrom kaj aranĝi kunvenon, ekzemple pri ESPERANTO KAJ HOMAJ RAJTOJ, se ni estus estintaj pli konsciaj pri la eblecoj tie. Tre facile estus formi ĝenevan paŭsaĵon de la novjorka Koalicio por Neŭtrala Helplingvo kun aliaj NRO-oj, sed oni bezonas homon surloke.
- En la muna reta mondo eblas fari parton de la kontaktoj kun aliaj NRO-oj de malproksime. Tion momente provas fari mi kaj irana esperantistino, sed helpo estus ekstreme bezonata. Temas pri tre tedaj administraj laboroj: starigi adresaron, sendi umopajn mesaĝojn, ktp. Sen tio neniu eĉ konscias, ke ni ekzistas.
- Se ni deziras ke iam ree la vorto Esperanto aŭ eŭfemisma esprimo por ĝi aperu en iu rezolucio de UN (same validas por UNESKO), la ĉefan laboron oni devas fari enlande por konvinki siajn respondecajn oficistojn en la Ministerioj pri Eksterlandaj Aferoj. Pro la facileco de la nuntempaj komunikoj la reprezentantoj surloke havas multe malpli da libereco nun ol ili havis iam. Mi mem plurfoje aŭdis landajn reprezentantojn, diskutantajn la malneton de la rezolucio pri edukado, deklari, ke ili devas "demandi sian ĉef-urbon" (laŭ la nun laŭmoda formala esprimo) pri aferoj relative malgrandaj (vera ekzemplo: ĉu en difinita subalinea de la rezolucio oni parolu pri "edukado pri aferoj koncerne sekson" aŭ pri "edukado pri aferoj koncerne reproduktadon"?). Do vi povas mem imagi, kion ili farus se oni diskutus pri enmeto de frazo pri Esperanto.


Pro tio UEA, la centra UEA, devas havi multe pli da kapablo daŭre kontakti la landajn aktivulojn (vin, la estraranojn de la landaj asocioj) kaj peti, instigi, gvidi, se ni volas alveni al veraj rezultoj. Aktivan helpon por fari tion mi bezonas. Neniu pli bone ol komitatano sperta pri la movado povus helpi. Temas pri iom teda kaj iom temporaba agado kaj mi scias, ke vi ĉiuj jam estas plene okupitaj, sed se eble iu el vi povas, li aŭ ŝi bonvolu kontakti min persone.

renato.corsetti@esperanto.org

## Internacia Kuirlibro en interreto



Ĝus estis kreita KUIRLIBRO ĉe la esperantlingvaj Vikilibroj (frata projekto de Vikipedio). Ĉiu povas kontribui per aldono de receptoj, kreskigo de la kuir-vortaro kaj aliaj aferoj. Vizitu eo.wikibooks.org/wiki/Kuirlibro kaj kontribuu!



## JOGURT-KUKO KUN POMOJ

Ĉu vi ŝatas jogurton? Jes? Do, vi bone zorgas pri via sano. Ĉu vi ne tro ŝatas ĝin? Nu, provu gustumi tiun ĉi simplan kukon, specialaĵon de nia amikino Egle, kaj certe vi ne ĉesos leki viajn lipojn!

### INGREDIENCOJ

1 parto	de jogurto
3 partoj	de faruno
2 partoj	de rafinita sukero
½ parto	de oleo
2	ovoj
12 gr	da pulvorigita gisto
150 gr	da pomoj
1 kulerpleno	da butero
	rum-aromaĵo



### PREPARADO

En pelvon metu ĉiujn ingrediencojn, krom pomoj kaj butero. Kirlu la tuton. Aldonu distranĉitajn pomojn. Enverŝu la paston en kukujon, buter- k farun-umitan. Kuiru en forno, antaŭvarmigita, je 180 C° gradoj dum 45 minutoj. Post malvarmiĝo, surmetu pulvorigitan sukron.

## Internacia renkontiĝo de Junularo pri naciaj kulturoj kaj lingvoj kaj Eŭropa identeco Rijeka-Kostrena – 20-22 aprilo 2005

En programo, ekde vendredo posttagmeze, prelegoj pri Lingvoj de Eŭropo – V. Morankić; Eŭropa identeco kaj naciaj kulturoj kaj lingvoj – Z. Tišljar; La makedona lingvo – J. Hudeček; Enkonduko en la cigana lingvo – S. Štivec; ekskursoj al ĉirkaŭaĵoj.

La partoprenkotizo de 13 eŭroj inkluzivas tranoktadon en la Esperanto-Domo (plurlitaj ĉambroj), ĉiujn manĝojn kaj ekskursojn. Informoj ankaŭ ĉe TEA-sekretario.

### SOMERA LERNEJO

#### en Torre Pellice - Torino – Italio

Ekde la 23<sup>a</sup> ĝis la 26<sup>a</sup> de Junio 2005 Itala Esperanto-Federacio kaj Torina Esperanto-Centro organizas intensivan Esperanto-kurson en la urbeto Torre Pellice je 60 km de Torino. La kurso celas instrui esperanton al novuloj kaj helpi progresantojn ĝin plibonigi kaj praktiki. Ĝi taŭgas kaj por italoj kaj por eksterlandanoj. La kotizo, inkluzivanta dormojn kaj manĝojn dum 3 tagoj, egalas al 190,00 € en unulitaj ĉambroj kaj 160,00 € en plurlitaj. Pliajn informojn petu al Rosanna Perottino zorion99@libero.it - Tel. + 39 0112055894

7-14 majo 2005, Braŝovo, Rumanio: 57<sup>a</sup> KONGRESO DE INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO Paĝaro pri ĝi troveblas ĉe: <http://57-ifef.rdsbv.ro>

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO  
Sidejo: Via del Coroneo 15 - 34133 Trieste  
tel/fakso: +39 040 763128

Reto: [esperantotrieste@adriacom.it](mailto:esperantotrieste@adriacom.it); [nored@tele2.it](mailto:nored@tele2.it)  
<http://arte.triesteincontra.it/esperanto>

Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio  
Poŝtekkonto N° 10834349